

Kulturaj Kajeroj

É. MAHÉ

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Jarabono : 40 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauviniere
44 - Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

MAJO - JUNIO - JULIO - AŬGUSTO

1980 - 3-4

KULTURAJ KAJEROJ

1980 MAJO-JUNIO-JULIO-AUGUSTO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

La voknomoj de D-ro L. L. Zamenhof B. Golden

Regionaj lingvoj en Francio H. Kristos

Iom pri tradukado el latina poezio G. Berveling

Olimpio : sanktejo (legendo kaj ritoj)

Roberto Burns — populara poeto popola A. Mollison

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.

El Grésillon

HISTORIO DE LA ESPERANTO-DOMO (DAŬRIGO)

En septembro 1952, reveninte hejmen, Micard ne retrovis la ĉiujaran laboron en la lernejo. Li estis nun emeritulo. Por la plimulto emeritiĝi signifas, ke oni sufiĉe laboris dum la vivo, kaj nun estas tempo por ripozi. Kontraŭe, Micard opiniis, ke finfine li havas tempon por labori, kaj fakte la juna nefirma Esperanto-Domo bezonis ĉiujn liajn momentojn. Estis kompreneble necese ordigi ĉiujare la financajn aferojn por ke neniu surprizo okazu sur tiu flanko. Estis necese okupiĝi pri ĉiuj detaloj koncerne la konstruaĵojn, kiuj postulis riparojn, la ĝardenon, kiu ne ĉiam donis la esperitajn fruktojn, ktp... Estis necese pretigi allogajn programojn, por ke venu la esperantistoj. Estis necese ĉeesti ĉiujn restadojn, precipe dum la unuaj jaroj, kaj labori en la kuirejo, en la oficejo, por ŝpari tiom da mono kiom eblis por rapidigi la kreskadon de la Esperanto-Domo.

Samtempe gesinjoroj Micard devis respondi la plej diversajn kritikojn. Kelkaj esperantistoj opiniis, ke oni tro multe parolis la internacian lingvon, aliaj tro malmulte. Kelkaj personoj volis pli da lukso en la kastelo, aliaj bedaŭris la simplecon de la unua jaro. Kelkaj ne komprenis kial oni starigis programojn kaj preferus nur libertempi en esperantista etoso. Sed kiam oni proponis liberajn ripozperiodojn neniu venis ĉar « la dato ne taŭgas ».

Ĉiuj tagoj de gesinjoroj Micard estis grandparte dediĉitaj al Gresillon. Plie konstanta problemo prezentiĝis : kiu zorgos pri la funkciado de la Esperanto-Domo ? Efektive la zorgoj lacigis ilin pli kaj pli ili sentis sin maljuniĝi. Geamikoj helpis gesinjorojn Micard dum la somero. Provoj de estrado de la Domo fare de direktoro malsukcesis pro diversaj kialoj. En 1963, Micard proponis al siaj amikoj la kreadon de « taĉmentoj » kiuj, dumsomere, okupiĝus ĉiu nur pri unu periodo, tiel dividante la laboron. En la somero 1964, tiu deĵorsistemo fukciis kaj ge-sinjoroj Micard ne estis devigataj ĉeesti la restadojn en Gresillon. Estis tre korŝire por Micard forlasi « sian » domon. Li aranĝis tion plenkonscie ĉar por li pli grave estis, ke vivu la Esperanto-Domo. Kiam li sentis, ke li ne plu kapablos, pro malsano, respondeci pri ĝi, li transdonis la gvidadon al amikoj sufiĉe frue por ke tiuj, kiuj poste prizorgos la aferon, trovu ĉe li ankoraŭ helpon je siaj unuaj paŝoj. Li mem proponis al la Administra Konsilantaro sian anstataŭanton. Li ne plu volis la titolon ĉar li ne plu povis labori. Li konservis la financan taskon, kiun li forlasis nur du monatojn antaŭ sia morto. Tiam konante sian sanstaton, li skribis al la nova prezidanto : « Mi sendas al vi ĉion, mi ne plu kapablas fari ion ajn... ».

Gesinjoroj Micard estis dediĉintaj dekkvar jaroj al la Esperanto-Domo.

El « Naskiĝo de Esperanto-Domo »
(daŭrigota)

Esperanto tra la Mondo

Jam pri la universala kongreso en Brazilio, en 1981 :

La estraro de U.E.A. decidis ke la kongresa ĉeftemo en Brazilio estos : « Kulturoj kaj Lingvoj : pontoj kaj baroj ». U.E.A. mem zorgos pri la organizado de pluraj vojaĝoj al la kongreso. Aliaj karavanoj ankaŭ jam preparĝas en diversaj landoj. Antverpeno (Belgio) kandidatiĝis por organizi la kongreson en 1982.

La fervojistoj kongresos en Germanio :

La Fervojista internacia Esperanto-Kongreso okazos en Regensburg, Germanio inter la 15a kaj la 21a de Majo 1981.

Fako kaj bulteno por komputistoj :

En Budapeŝto, 32 komputistoj kaj komputilistoj fondis fakan esperanto-rondon kiu aktivas sur la jenaj kampoj : perkomputila laboro, scienca literaturo, tradukservo, ktp... Aperis unuaj numeroj de la informilo « Predis » (adreso : Grupo komputista, Pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario).

Ekonomia bulteno pri Usono :

Nova periodaĵo : « Ekonomia Bulteno pri Usono » prezentas informojn, analizojn, klarigojn pri tiu lando. Ĝi estas abonebla en la libro-servo de U.E.A. (18 gld. jare). Provekzemplero kontraŭ unu internacia respondkupono al la adreso : 7008, Millwood Road, Bethesda, Maryland 20034, U.S.A.

Esperantlingvaj resumoj en ĉina scienca revuo :

En nova ĉina bulteno pri entomologia taksonomio, nomata « Entomotaxonomia », resumoj de la artikoloj estas faritaj en pluraj lingvoj, inter kiuj, Esperanto. Cetere, la redaktaj stabanoj de la revuo estas fervoraj esperantistoj. Adreso : « Entomotaxonomia », c/o N.W. Coll. Agr. Wukung, Shaanxi, Ĉinio.

La Internacia Junulara Festivalo 1981 :

Dum Aprilo, okazis kun granda sukceso la 4a Internacia Junulara Festivalo, en Gorica (Italio).

Niaj junaj italaj amikoj de nun preparas la 5an Festivalon (« Esperanto kaj humuro »). Ĝi okazos de la 16a ĝis la 21a de Aprilo 1981, en Porretta Terma, proksime de Bologna.

Bonega laboro en Britio :

— Brita Esperanto-Asocio presigis « Senpaga enkonduka koresponda kurso », distribuas ĝin (ekzemple, oni metas la unuajn lecionojn en publikajn bibliotekojn, kun okulfrapa afiŝo), kaj starigis tutlandan instruistan reton. La unuaj 22000 lecionoj estis jam distribuitaj antaŭ kelkaj monatoj.

— La grupo de britaj parlamentanoj amikoj de Esperanto nombras nun 108 parlamentanojn.

— Post la favora rezolucio pri Esperanto de Monda Federacio de Asocioj pri Unuiĝintaj Nacioj, Brita Esperanto-Asocio sisteme distribuis specialan informilon al la filioj de Asocio pri U.N. en Britio. La du organizoj gastigos en siaj kongresoj, informbudon unu pri la alia.

En Hinda Unio :

Oni nun rimarkas samtempan interesiĝon pri Esperanto en diversaj ŝtatoj de Hinda Unio. Pluraj grupetoj formiĝas, sed, en tiu grandega kaj malriĉa lando, la problemoj estas gravaj por tiuj favoraj kernoj.

Konvenus ke la internacia esperanto-movado pli kaj pli atentu la helpon al la esperantistoj de la evoluantaj landoj.

Bonvena kasedo :

Aperis la anoncita kasedo kiu akompanas la franclingvan lernolibron « Cours rationnel et complet d'Esperanto », eldonita de S.A.T.-amikaro. Registris ĝin Olivier Tzaut kaj Perla Martinelli. Jen grava helpo por novaj franclingvaj esperantistoj kiuj lernas izole. Prezo : 30ff.

— S.A.T.-amikaro reeldonis ankaŭ la « Dictionnaire de poche ».

— Serio de 5 disketoj kaj kasedo ekzistas ankaŭ por « Junulkurso ».

Pasporta Servo :

Ĉefe se vi estas juna, la « Pasporta Servo » ebligas al vi esti akceptita ĉe 360 gastigantoj en 48 landoj. Ĉe ili, vi povas senpage tranokti kaj havi, tiel, interesajn kontaktojn.

La aliĝo al la servo kostas 15 FF kaj la aliĝintoj ricevas la liston de la adresoj. Adreso : S-ino J.-M. Cash, 9, rue du Languedoc, 78690 Les Essarts-le-Roi (Francio). La adresoj de eventualaj gastigantoj estas ankaŭ dankinde ricevitaj.

Harold Wilson por Esperanto :

La estinta brita ĉefministro Harold Wilson deklaris al la gazeto « People » sian apogon al la internacia lingvo, akceptante la postenon de vic-prezidanto de la Sindikata kaj kooperativa Esperanto-grupo. Tiu grupo estis fondita en 1977 por krei pli grandan apogon al la lingvo en la laborista movado.

En la gazetaro :

— La staba gazeto de la Sekretariejo de Unuiĝintaj Nacioj en Nov-Jorko, « Secretariat News » aperigis artikolon pri Esperanto kaj la kreskantaj ligoj inter U.E.A. kaj U.N.E.S.K.O. Foto montris kursanoj en la nova oficejo de U.E.A. en Nov-Jorko.

— En la internacia tradukista gazeto « Babel » eldonata sub aŭspicio de UNESKO, aperis artikolo de Vilmos Benczik, konata hungara esperantisto, pri la rolo de Esperanto kiel pontolingvo rilate al la aziaj literaturoj. « Babel » regule nun aperigos esperanto-novaĵojn.

— Okaze de la 75a datreveno de la elstara soveta lingvisto kaj esperantisto Prof. D-ro Paul Ariste, la grava ruslingva semajna revuo « Ogonjok » aperigis intervjuon kiu ĉefe temis pri la rolo kiun povus ludi Esperanto por la monda lingvo-problemo.

LA VOKNOMOJ DE D-RO L.L. ZAMENHOF

Bernard GOLDEN

Multaj esperantistoj ne bone komprenas, kial la aŭtoro de Esperanto havas diversajn voknomojn. Per la sekva analizo de la demando, mi provos helpi ilin orientiĝi en la zamenhofa onomastika labirinto.

Por pli bone kompreni la uzadon de nomoj fare de d-ro Zamenhof, estas necese diri kelkajn vortojn pri la sistemo de nomdonado en judaj familioj. La unua nomo, kiun juda infano ricevas estas hebrea nomo, kiu kutime estas tiu de mortinta avo aŭ, se tiu ĉi ankoraŭ vivas, de alia karmemora parenco. En la libro de naskiĝintaj judoj de Bjalistoko en la jaro 1859, la nomo de d-ro Zamenhof estas registrita, laŭ la rusa leĝo, ruse kaj hebree kiel Lejzer. Tiu ĉi nomo vere estas modifita formo de la hebrea nomo Eliezer. La zamenhofologo N.Z. Maimon klarigas, ke la ŝtatrabeno, kies tasko estis registri naskojn, skribis la hebrean nomon laŭ ties prononco en la jida lingvo. Anstataŭ la kvar silaboj de El-i-e-zer, restis nur du post mallongigo rezulte de forigo de la komenca vokalo/lingvistika fenomeno konata kiel aferezo/kaj diftongigo de la sekvaj du vokaloj. Tiel oni akiris la pli facile parolatan dusilaban Lej-zer, uzatan en la ĉiutaga, profana vivo. Male, por religiaj celoj, oni ĉiam uzis la plenan formon Eliezer. Ŝajnas, ke ekzistas nur unu ekzemplo de la uzo de tiu hebrea formo de la voknomo de Zamenhof. Iŝmael Gomes Braga, skribante pri ĝia signifio (« helpato de Dio ») mencias, ke en la hebrea eldono de la « Fundamento de Esperanto », la nomo de la aŭtoro aperas kiel d-ro Eleazer Zamenhof.

Okazas, ke popoloj influataj de aliaj kulturoj, alprenas du nomojn, propralingvan kaj alilingvan. Oni ofte renkontas tiun kutimon en la nuntempa Afriko, kie unu voknomo devenas de la loka indiĝena lingvo kaj la alia estas de eŭropa origino. Ankaŭ ĉe judaj familioj ekzistis tia nomsistemo, funkcianta ĉefe por kontaktoj kun nejudoj. Oni donas al infano alilingvan nomon komenciĝantan per la sama litero por tiel memorigi la originalan hebrean nomon. La nomoj de familianoj de Zamenhof ilustras tion. Lia avo estis Fajvel en la hejma ĉirkaŭmedio, sed li estis pli bone konata kiel Fabian. Marcus Zamenhof, la patro de d-ro Zamenhof ankoraŭ vivis, kiam d-ro Zamenhof naskiĝis, tiu estis nomata laŭ alia karmemora parenco. Estis la plej aĝa frato, naskiĝinta en 1868, kiu ricevis la nomon de la avo. Kvankam li estis konata al esperantistoj kiel Felikso, dum il frekventis la gimnazion en Varsovio, li portis la nomon Fabian. Inĝ. Ludoviko Zamenhof, la filo de Adamo, ricevis la nomon de sia avo, d-ro Zamenhof. Du aliaj fratoj de la aŭtoro de Esperanto, Henriko kaj Leono, uzis po du voknomojn ; kiel gimnazianoj ili estis konataj kiel Grigorij kaj Lev respektive. Pri tiu uzo de ne-judaj nomoj diras Maimon : « Evidente la alprenitaj 'eŭropaj' nomoj ne estis konstantaj, ne integra parto de la personeco. Oni povis modifi ilin laŭbezone. » Tion faris la Zamenhof-fratoj.

Pro la klerisma spirito reganta en la familio de Zamenhof, nek la jidlingva Lejzer, nek la hebrea Eliezer taŭgis. Estis elektita tria nomformo, parenca al la ĵus menciitaj, kiu estis modelita laŭ alilingva etimo : Lazar, variaĵo de Lejzer, troviĝanta en la Nova Testamento, do internacie konata. Tio estis la limo por nomŝanĝo ebla en la provinca urbo Bjalistoko. Poste, kiam la familio transloĝiĝis al Varsovio, pli drasta modifo estis permesebla. Hejme oni jam komencis nomi lin Ludvik aŭ, karesnome, Lutek, sub influo de la rusa kaj pola lingvoj parolataj en la gepatra domo.

Pli profunda esploro de la nomuzado de d-ro Zamenhof estas ebla surbaze de oficialaj dokumentoj de du specoj : /1/ tiuj de ŝtataj instancoj koncernantaj Zamenhof kaj /2/ tiuj, kiujn Zamenhof mem preparis kaj subskribis. Eldonita en 1977 estis tre utila verko por tiu ĉi celo : **Halina-Dokumento.** Ĝi enhavas kopiojn de ruslingvaj dokumentoj de la varsovia gimnazio kaj la universitatoj de Moskvo kaj Varsovio. En la 1930-aj jaroj tajpis kaj elrusigis la kopiojn varsovia esperantistino, Halina Edelbaum. Diversaj formoj de la voknomoj uzata de Zamenhof kiel mezlernejano /1874-1879/ kaj kiel universitatano /1879-1885/ estas registritaj per la cirilia alfabeto, sed ili ne ĉiam estas fidele transkribitaj latinlitere. Oni rajtas supozi, manke de kontraŭa atestaĵo, ke fraŭlino Edelbaum precize kopiis la nomojn kiel ili estis sur la originalaj ruslingvaj dokumentoj, kiujn ŝi havis la bonŝencon konsulti. Cetere, oni esperas, ke la funkciuloj, kiuj skribis la nomojn de Zamenhof ruslingve, ne faris kapricajn ŝanĝojn aŭ ortografiajn erarojn.

Ekzameno de la lernejaj dokumentoj de la gimnazia periodo de d-ro Zamenhof, ampleksanta la jarojn 1874-1879, malkovras preskaŭ alternan uzon de Lejzer kaj Lazar. Ĉar la formo Lejzer estis oficialigita en la naskregistro, ĝi estis plejofte uzata sur diversspecaj lernejaj dokumentoj : la protokolo de la Pedagogia Konsilantaro/ taglibro de ĝiaj kunsidoj/, distingoj por premioj, kaj ekzamen-rezultoj. La unua registro de la nomo Lazar datiĝas de septembro, 1876, kiam la Pedagogia Konsilantaro denove liberigis Zamenhof de lernejenpago, ĉar li estis filo de instruisto. Poste, la du nomoj estis uzataj — jen Lejzer, jen Lazar — kvazaŭ tute ne gravus. Kiam en aprilo, 1879, Zamenhof pretigis peticion al la gimnazia direktoro rilate allason al la maturekzameno, li subskribis ĝin Lazar Zamenhof. Estas konkludeble, ke la gimnaziano Lejzer Zamenhof fariĝis Lazar Zamenhof proksimume en la jaro 1876. Kiam li estis studento en la medicinaj fakultatoj de Moskvo kaj Varsovio post 1879, la antaŭnomo Lazar oficiale enradikiĝis.

Sub influo de la rusa sistemo de personaj nomoj, kelkaj dokumentoj havas tri nomojn : la voknomon, la patronomon kaj la familian nomon. En aŭgusto, 1879, la subskribo sur peticio por esti akceptita en la Medicina Fakultato de Moskva Ŝtata Universitato estis Lazar Markovich Zamenhof. Laŭ rektora atesto de la sama universitato, datita aŭgusto, 1881, la studento estis Lazar Motelev Zamenhof, kaj li mem subskribis la kuracistan juron en januaro, 1885, kaj leteron en februaro de la sama jaro kiel L.M. Zamenhof. Lia kuracista diplomo de Varsovia Universitato, datita la 28-an de februaro, 1885, portas la nomon Lazar, filo de Marko /v. Motelo/ Zamenhof.

Post la doktoriĝo, tamen, la nomo Lazar publike ne plu aperis. En junio, 1889, Zamenhof sendis poŝtkarton al Vladimir Majnov, ĵurnalisto en Peterburgo, informante lin, ke « Mia plena nomo estas Ludvigo Lazaro /Ljudovik Markoviĉ Z—f/. » La interkrampa nomo estis skribita per la cirila alfabeto. En la jaroj 1898-1900 Zamenhof kunmetis siajn du plej novajn voknomojn, Lazaro kaj Ludoviko, kaj ekde tiu tempo aperis en ĉiuj verkoj la duobla nomo en mallongigita formo : L.L. Zamenhof. Tiu ĉi modifo estis bezonata, ĉar unu el la fratoj, Leono, esperantistiĝis en 1898, fariĝis aktiva en la pola movado, kaj ankaŭ verkis en Esperanto. Estis, do, necese diferencigi d-ron L. Zamenhof disde d-ro L.L. Zamenhof.

Ankoraŭ aliaj variaĵoj de la voknomoj de d-ro Zamenhof rezultas de la kutimo en kelkaj etnolingvoj traduki tiajn nomojn. Tiel, troviĝas jenaj formoj :

angla : Ludovic Lazarus.
franca : Louis-Lazare.
germana : Ludwig Lazar.
hispana : Luis Lázaro.
hungara : Zamenhof Lázár Lajos /rimarku la inversigon laŭ la hungara kutimo/.
pola : Ludwik Lazarz.

Konsultitaj verkoj :

GOMES BRAGA, IŜMAEL. 1955. Sperto de Zamenhof. **Nica Literatura Revuo,** vol. 1, n-ro 1, septembro, p. 9-12.

HALINA DOKUMENTO PRI LA STUDENTAJ JAROJ DE L.L. ZAMENHOF. 1977. Osaka.

MAIMON, N.Z. 1978. **La kaŝita vivo de Zamenhof.** Tokio.

MAIMON, N.Z. 1980. Marĝene al la HALINA-dokumento. **Literatura Foiro,** vol. 11, n-ro 59, februaro, p. 14-15.

REGIONAJ LINGVOJ EN FRANCIO

DUA PARTO : LA PROBLEMOJ DE LA REGIONAJ LINGVOJ.

1. — Rilate al la ŝtato kaj al la franca lingvo.

Jam de 1539 ekzistas la batalo inter la Franca kaj la regionaj lingvoj. En 1539, nur kelkajn jarojn post kiam Bretonio estis kunigita al Francio, kaj Savojo, longe sendependa, estis milite okupita de la francaj trupoj, en 1539 do, leĝo estis proklamita : la franca lingvo estu la sola lingvo en administracio kaj en la tribunaloj. Post tiu edikto de Villers Cotterets, nenio ŝanĝiĝis. La diversaj agadoj de la reĝoj, de la ministroj kaj de la respubliko daŭrigis la tiom bone komencitan mortigon de la regionaj lingvoj. Kial do la centra estraro tiel klopodis asimili la regionajn lingvojn ? Ne nur Francio, sed Anglio, Italio kaj aliaj same agis, kaj pro la samaj kialoj. La baza memrajtigado estas, ke ekzistas du tipoj de lingvoj : la valoraj lingvoj (tiuj de la estrantaj popoloj), kaj la « sovaĝaj » lingvoj, aŭ dialektoj, kiuj estas tiuj de la mallertaj, malkleraj perdintoj. Pro tio, estos rajtigita la vera sistema ekstermo de tutaj lingvoj kaj kulturoj. La ĉefaj asertoj kvazaŭ kialoj estis precipe politikaj kaj socikulturaj : **politikaj :**

— la unueco de la nacio postulas la unuecon de la lingvo ;

— por bone direkti kaj kontroli la nacion, oni bezonas unu solan lingvon en administracio, tribunaloj, kaj publikaj lokoj ;

— por respekti la principon de egaleco en instruado, estas necese instali uniformecon de la programoj sed ankaŭ de la iloj de instruado.

sociaj : — dialektoj estas barilo al la akcepto de progreso kaj moderna vivo. Oni eĉ asertas, ke certaj regionoj estas malpli prosperaj pro tiuj malkleraj parolmanieroj. Jen brita oficiala teksto de 1847 pri Kimrujo : « la kimra lingvo estas grava malavantaĝo por Kimrujo, kaj granda barilo kontraŭ ĝia morala progreso kaj komerca prosperado de ĝia popolo (...). La kimra lingvo respondecas pri ĉiuj malbonaĵoj de Kimrujo : malklereco, malmoraleco, kaj nekonformismo ». Tio, kompreneble, ankaŭ valoras pri Francio.

La ŝtato havas grandan elekton de iloj, kaj gi ofte ne elektis, sed uzis ĉiujn kunajn :

— leĝojn por ke la estranta lingvo estu deviga kaj sole uzata ;

— premon de la administracio (ekzemple, rifuzo akcepti certajn bretonajn antaŭnomojn) ;

— financajn mediojn ;

— movojn de popoloj (ekz. en Korsiko). En Bretonio, pli ol unu miliono da Bretonoj iris al Parizo dum la XXa jarcento, pro monaj kaŭzoj ;

— uzon de aliaj influhavaj aŭtoritatoj, kiuj helpas en la dissendo de ideologio favora al la estranta lingvo, ekz. la religiaj estroj.

2. — Rilate al la publika opinio.

La ŝtato havas alian ilon por perforte asimili kaj neniigi la regionajn lingvojn : la psika premo de parto de la popolo, la kulpigo de la uzantoj de la regionaj lingvoj. La plej altaj tavoloj de la loka socio rapide akceptas la lingvon kaj pensmanieron de la estroj, de tiuj kiuj sukcesas, de la plejmulto. La lingva kulpigo estas terura afero kies rezultoj estas inter la plej efikaj manieroj senpersonecigi la regionon. Ĝi havas multajn aspektojn.

La plej grava estas la malnova, ne plu oficiala, tute malhonesta **kulpigo de la infanoj.** Kaj, tra la infanoj, de la gepatroj, precipe de la patrino. En la lernejo, oni malpermesas, ke ili parolu sian regionan lingvoj gepatran. Se ili tion faras, ili estas punataj, ne korpe, sed sub formo de humiligo, kiu vundos ilian ideon de si mem : primokata, en pasinteco, ili devis porti la hontan simbolon (ĉu ligna ŝuo, ĉu paneleto, ĉu bastoneto...).

Ankaŭ estas la aspekto sub kiu oni prezentas la parolanton de la regiona lingvo en popola **literaturo.** Li estas prezentata kiel necivilizata, maleleganta, ne kapabla je grandaj sentoj aŭ grandaj agoj, nur intereseta en maldelikataj negravaj aferoj. Kiu ne konas Bécassine, juna bretona stultulino en Parizo, kies aventuroj ridigis niajn gepatrojn en ilia junaĝo ? Ŝajnas al mi ŝi kaŭzis pli da malbonaĵoj al la bretonoj ol intencis la aŭtoro.

La tria aspekto estas la tre aĉa apero de la **raso de la turisto.** La bezono de mono (pro la financa sinteno de la ŝtato) devigis la regionanojn akcepti turistojn ; kaj tiuj alvenis, kun sia granda avantaĝo : riĉeco. La rezulto estis, ke la antaŭaj trankvilaj parolantoj de la regionaj lingvoj fariĝis humilaj servistoj de la turistoj. Por servi tiujn superulojn, ili nepre devis lerni la francan, kaj adopti tion kio plaĉis al la turistoj. Tiel, ili klopodis kuiri laŭ pariza maniero, ili malfermis ĉiovendejojn, kaj ili kreis grupojn de « popoldancoj » aŭ « iniciado al popolkantado »... Ĉe la fino, la plej grava rezulto estis la sento de honto. Nun, ili hontas paroli la tiel nomatan dialekton, ili forĵetas sian gepatran devenon kiel arkaikan, kaj ili tutkore akceptas la signojn de l'progreso. La honto eĉ koncernas la manieron paroli la francan. Oni vere povas paroli pri rasismo ; en Usono, unu guto da sango sufiĉas por esti konsiderata kiel nigrulo ; en Francio, una litero « ne pinte » eldirita sufiĉas por suferi la « komplekson de Bécassine ».

3. — Rilate al si mem.

La plej grava problemo de la movadoj por regionaj lingvoj rilate al si mem kuŝas en la drama malfacileco sin defini kaj limigi.

La sama regiona lingvo prenas plurajn malsimilajn aspektojn en diversaj lokoj de la regiono. Ĉiu Kataluno povas tuj rekoni kiam vi alparolas lin en kataluna lingvo ĉu vi estas franca aŭ hispana kataluno ; ekz. « iomete » estas « una miqua » en Barcelono, kaj « un xiq » en Perpignan. Same, la Vaskoj spertis la bezonon interkonsenti pri unu formo de « unuigita vaska lingvo » (ekz. antaŭ tio, onis havis elekton inter 4 skribitaj formoj por diri « vaska lingvo » : euskera, euzkara, eskuara. Ŝajnas, ke la prononciado estis la sama). La Alzaca havas plurajn malsimilajn formojn de la lingvo. Oni povas distingi 4 formojn de la Bretona, el kiuj unu estas pli malsimila je la aliaj ; pri la skribita bretona lingvo, la klopodoj por unuigi la dialektojn estas plej efikaj. Pri la Okcitana, la problemo ŝajnas al mi nesolvebla ; la gvidanto mem de la movado rekonas, ke ekzistas ne unu regiona lingvo, sed pluraj dialektoj : « La okcitana estas malsimila laŭ la spaco kaj la tempo : laŭ fonetikaj kriterioj, oni povas distingi dialektojn kiuj ne korespondas kun la 6 provincoj de Okcitanio : la dialektoj provenca, langvedoka, gaskona, limoĝia, aŭvernja kaj livrara. Sed ne estas firmaj limoj inter ili. » Li aldonis « la interkompreno ne estas 100 % ; estas regionoj de ombro. » Mi tiam menciis mian propran sperton : en Grésillon, juna okcitano parolis en sia regiona lingvo al maljuna sinjoro kiu bone scipovas la provencan : evidenta nekompreno

sekvis. La respondeculo ridetis : «Jes, la Provencoj ofte rifuzas esti konsideratoj kiel okcitanaj. » Mi ne insistis, sed mi memoris la rondajn okulojn de la maljuna aŭvernjanino al kiu mi demandis, dum mia enketo : Kial vi parolas la Okcitanan ? ; ŝi diris : « Mi ? Mi NE konas la okcitanan ! ».

Pri la Okcitana, la problemo ne estas sole lingva. Dum Korsikoj, Kataluno Vaskoj... ĉiam certe scias ĉu ili staras sur sia lando aŭ sur fremda Francio (ne ŝerco !), Okcitanoj havas gravajn problemojn por sin limigi. Oficiale, Okcitanio estas 31 departementoj, 6 provincoj, la parto de Francio ne okupita dum la milito ; sed la homoj sentas sin provencaj, aŭ langvedokaj... Ne okcitanaj.

4. — Rilate al aliaj movadoj.

En unu sama regiono, pluraj movadoj havas la saman celon : savi la personecon de la regiono fronte al la tutpotenca Francio ; sed ŝajnas, ke tiuj diversaj movadoj vivas (vivetas-) sen multaj rilatoj inter si.

a — **Folkloro** en ĉiuj tiuj regionoj estas vivanta realaĵo. Oni povus pensi, ke la amantoj de la regionaj lingvoj amus la kulturon reprezentatan de la « folkloristoj ». Sed ne ĉiam ; mankas fido inter ili. Mi resumos la sintenon de la respondeculoj de la regionaj lingvoj pere de 2 frazoj :

— la folkloristoj prostituas la lokan kulturon por turismo ;
— aŭ : folkolro estas « mallibera formo de regiona kulturo » (Okcitana respondeculo).

b — **Ekologio,** de kelkaj jaroj jam, ĝuas gravan prosperadon en la regionoj. Kune kun pacemaj idealistoj, ekologistoj ofte savis mortantajn vilaĝojn kaj malebligis la kriman modernigon de la kamparo. Oni povus pensi, ke ambaŭ estas regionalistoj, do kunagantoj. Sed ne. Se ili kelkfoje kune agas (ekz. pri la Larzac-afero), la ĉefa baro al ilia kunlaborado estas, ke tre ofte ili oponas unu la alian en la fakto, ke la ekologistoj volas protekti la regionon kontraŭ ĉiu nenatura eknomio, dum la movado por la regiona lingvo (okcitana ekz.) favoras la industrialigon de la regiono pro ekonomiaj kaŭzoj. Sed ŝajnas, ke en Alzaco estas alia situacio.

c — **Kontraŭmilitismo.** En Bretonio antaŭ kelkaj jaroj, la regionalistoj kontraŭ batalis la ŝtatan decidon malfermi novan militistan kampon. Mi jam menciis la vorton LARZAC ; jen artikolo originale verkita en Esperanto el ICEM-ESPERANTO N° 10 (Dec. 78) : « lun fojon estis en nia okcitana lando regiono kie homoj kaj ŝafoj malriĉe sed trankvile vivis : eĉ la loka nomo de « Larzac » spegulas la sovaĝan naturon kaj la akran venton kiuj regas tie. Ne nur kamparanoj vivis sur tiu grundo, sed ankaŭ soldatoj kiuj vagadis de tempo al tempo inter la dratetoj de iu milita barakaro. Ĉu oni rebatis pro la ĝeno, ĉu oni ĝojis pro la gajno, dependis ĉu oni estis kamparano, ĉu oni estis komercisto... Ek de kelkaj jaroj, niaj ŝtataj moŝtoj decidis pligrandigi la barakaron ; necesas : militistoj estas preskreskuloj kiuj bezonas pli kaj pli da spaco por ludi per modernaj sciencaj (kaj tamen danĝeraj) ludiloj ! — La kamparanoj ? vi demandas. — Tute ne gravas : ili estas malmultaj, do tute simple ili foriros ; kaj vidu : ni estas tiel bonaj, ke ni eĉ aĉetos iliajn farmobienojn. Feliĉe niaj civiluloj estis kuraĝaj kaj defendis siajn rajtojn vivi kaj labori surloke, rifuzante obei al tiu maljustza decido. Ili ne batalas sole, kaj hodiaŭ multaj kamparanoj, pacistoj, neperfortistoj, kontraŭmilitaristoj ktp... vigle subtenas ilian agadon. La afero iĝis nacia kaj okazas nun grava batalo inter FORTO kaj RAJTO, kie oni vidas homojn batali kontraŭ anonima administracio. Por atentigi popolon al sia problemo (...) la kamparanoj piediris al Parizo : ili marŝadis dum 720 km sub vintra vetero ; kaj en Parizo, pli ol 40 000 personoj venis por helpi ilin. Tamen, post 8 jaroj, armeo daŭrigis sian sengloran batalon, kaj finfine la ŝtato konfirmis la eksproprietigon de la kamparanoj. »

La Larzac havas valoron de simbolo por la ekologistoj, la pacifistoj, kaj eĉ la regionalistoj pri lingvo : pruvo estas la tre fama moto : « gardarem lo Larzac » (= ni gardos la Larzac), la kontraŭmilitistoj elektis la regionan lingvon por elkrii sian intencon. Sed oni bone substrekis por mi, ke tiu komuna agado estas izolita, ne unua paŝo al komuna irado.

Unuvorte, ŝajnas al mi, ke la movado por la regionaj lingvoj deziras esti pli kultura ol politika. Eble domaĝe.

d — **aliaj lingvoj.** Fine, kaj kvazaŭ konklude, mi deziras mencii la sintenon de la amantoj de la regionaj lingvoj rilate al aliaj lingvoj.

Rilate al la grandaj naciaj lingvoj, ili havas la saman sintenon kiel rilate al la Franca : la Angla, la Hispana ktp estas imperiistaj koloniistaj premegiloj de venkintaj popoloj sur venkitaj popoloj. Rilate al la internacia lingvo Esperanto, ili — bedaŭrinde — estas miopaj. La respondeculo pri la Okcitana komence konsideris la Esperantistojn malamikoj (ĉu internaciismo ne estas unu ekstremo de kiu regionalismo estas la dua ? Ĉu ili ne batalas internaciismon ?) Post klarigo de la sinteno de pluraj esperantistoj (inter kiuj la kataluna respondeculo Sro Llech Walter), li pli mildiĝis : jes, ŝajnas racie, ke ĉiu homo bezonas tri lingvojn : la regionan lingvon por siaj rilatoj en la regiono la nacian lingvon por la rilatoj en la lando (ekz por ke vasko komuniku kun Bretono) ; kaj Esperanto por la rilatoj ekster la lando (ekz. por ke Vasko komuniku kun Greko) ; jes... pere de tri lingvoj, oni povus interparoli kun la tuta homaro... Li akceptis miajn klarigojn, jes, sed mi devas diri, ke li pli klopodis konvinki min al la okcitana ol lasis min konvinki lin al Esperanto. Same, antaŭ preskaŭ du jaroj, oni organizis en Langvedoko publikan diskuton inter esperantistoj kaj okcitanistoj. La esperantistoj estis tre seniluziigitaj ĉar la aliaj ne diskutis, sed ĉiam klopodis preni la atenton kaj la tempon por prezenti kaj defendi sian propran movadon.

Oni do devas konfesi, ke la politika analizo de la lingvoj estis pli profunde farita de la Esperantistoj ol de la estroj de la regionaj lingvoj.

Hélĝne KRISTOS.

ESTIS INTERESE LEGI...

— **« La renaissance des cultures régionales en Europe »** de Ricardo Petrella ; Ed. Entente ; 1978 ; 312 pp.

— Artikolon en PARIS-MATCH de Julio 79 pri Korsikio : **« Maintenant, il ne nous reste plus que les bombes ».** Dum mi ne povis sendi mian demandaron al Korsikoj, mi trovis en tiu artikolo la respondojn de la 21 akuzitoj korsikaj al demandaro sendita al ili de la ĵurnalisto de Paris-Match. La demandoj estis preskaŭ la samaj kiel tiuj de mia demandaro !

— du artikolojn en la sama revuo pri la hispanaj baskoj :

— **« La guerre des vacances ».**
— **« Notre objectif, c'est aussi le pays basque français ».**

— **« Hem de casar en Baptiste »** (Kataluna teatraĵo) Pere Guisset; Ed. du Castillet ; Perpignan 1975 ; 64 pp.

— **« Cours d'initiation à la langue catalane »,** René Llech-Walter ; Ed. de Catalogne ; 3e édition 1967 ; 70 pp.

— **AVUI** (taga gazeto) N° 1.103 (4a jaro). Premsa catalana, S.A. Barcelona. Director : Jordi Maluquer i Bonet.

— Artikolon en « Le Monde de l'Education », Marto 79 : **« Maternelles en Basque ».**

— Revuojn de la vaska Asocio SEASKA : **« Ikastolak »** : N° 4 (Apr. 78), N° 6 (Jan. 79), kaj N° 7 (Marto 79). La revuo N° 6 temas speciale pri pedagogio.

— Artikolon de F. le Magadure en Kulturaj Kajeroj pri la deveno de la Bretona lingvo (sed mi ne plu posedas tiun numeron de K.K., kaj ne plu memoras la jaron nek la numeron... Aperis en vintro 78 aŭ 77).

IOM PRI TRADUKADO EL LATINA POEZIO

1. Jam plurfoje antaŭ mi, opinioj estis esprimitaj pri tradukado poezia el la latina kaj helena lingvoj ; i.a. en La Nica Literatura Revuo pluraj artikoletoj kaj — kio eĉ multe pli konvinkige pledas — belegaj tradukoj aperis, ekde l' 18a numero (1958). Nia grandega duopo Kalocsay-Waringhien iom malsamopiniis pri detaloj, sed tamen profunde ili opinie samis en tio, ke — laŭ ili — oni ne traduku la klasikajn heksametrojn per ekzakte sama metriko. Nu, kun ili konkurenci mi ne kapablas, certe ne en poezia eltrovemo, sed tamen mi kredas, ke mi rajtas kontraŭargumenti.

2. Kio, do, estas — kaj kia ? la heksametro ?

Temas pri versoformo ege abunde uzita en latina kaj helena, kiun la Romianoj, kiel multon alian de sia kulturo, transprenis el grekaj ekzemploj.

Ĝi estas karakterizata de du malsimilaj ecoj : unue ĝi konsistas el sufiĉe strikte ligita alternado de longaj kaj mallongaj silaboj, kaj due ĝin karakterizas tre kaprica (kaj ĝuste pro tio malenua) saltado de vortakcentoj.

La skemo de longaj kaj mallongaj silaboj estas jena :

(— = longa ; v = mallonga ; signoj super alia = elekteblo).

Tio signifas, do, ke kvarfoje sekvas longan silabon aŭ longa aŭ du mallongaj, kaj post kvina komenca longa preskaŭ ĉiam sekvas du mallongaj (ĉar en tiu loko de l' verso ege malofte du sinsekvajn longajn oni trafas) kaj fine sekvas longa kaj indiferente ĉu longa aŭ mallonga. Entute do estas ses unuoj metrikaj, kies ĉiu komenciĝas per longa.

Kio estas longa silabo en tiuj lingvoj ? — Longaj estas vokaloj « nature » longaj (pro sia kazo, ekz.) aŭ tiuj, kiujn sekvas pli ol unu konsonanto. Nu, en esperanto ion tian ni ankaŭ havas, se ja ne pro kazoj : la diferencigo bone eblas inter vokalo kiun sekvas nul aŭ maksimume unu konsonanto, kaj vokalo, kiun sekvas konsonantoj pluraj. Kaj la antaŭlasta vokalo, pro la akcentado, estas ja « nature » pli longa ol la ceteraj...

3. Kiel aspektas tiu heksametro ?

Mi prenas kiel ekzemplojn la komencversojn de Lukrecio : Aeneadum genetrix, hominum divumque voluptas — k.t.p. : mi iom transliterumas laŭ esperanta prononco :

(' signifas la lokon, kie troviĝas la vortakcento en la latina ; per — aŭ v mi indikis (mal) longecon).
Ajnéadum génetriks, hóminum divŭmkve volŭptas
âlma Vénus, kaĵli sŭbter labéntia signa
kvaj mâre mavigerum, kvaj téras frugiferéntis
konkélebras, per te kvòniam génus ômne animântum
(e — a : kvazaŭ unu vokalo).

K.t.p. Kiel oni tuj konstatos, la vortakcentoj senbride galopas super la frazoj. Tio, laŭ mi, estas unu el la spicaĵoj de tiu ĉi poezio, al kiu mankas la tiom kutima al ni esperantistoj nocio « rimo ». Aliflanke la versojn kuntenas la ligoj de ĝia metrika alternado inter longaj kaj mallongaj, kiel jam dirite.

4. Kiel, do, aspektus tia heksametro en esperanto ?

Mi tradukis laŭ tiu ĉi principo la komenco de Lukrecio : tie ĉi mi ne indikos la galopadon de l'vortakcentoj : tiujn vi mem jam konas, ĉu ne ? Kaj la alternadon de longaj — mallongaj vokaloj, nu mi esperas, ke el miaj ĝisaj vortoj vi tion iam komprenas. Volonte mi ricevus reagojn de la legantoj al tiu ĉi mia maniero, traduki heksametrojn.

Patrin' Ajneasida, vi homa, vi dia ĝuego, milda
Venuso, vi sub la ĉiela ĉi astrovagado ŝipportantan
maron, landojn fruktodonantajn plenvivuligas, —
dank' vin tuta la gent' animula fuĝas vin ventaro,
diin', kaj nuba l' amaso, vin kaj vian venon ; vin ter'
dolĉa la bunta flore salutas ; vin alridas mara ebeno,
trankviligite glimas brile difuze ĉielo.

Ĉar ja apenaŭ montriĝis printempa beleco de
l' tag' kaj liberiĝis naska brizo de vento, — tuj enaere la birdoj vin, ho diino, salutas jam dum proksimiĝad', sorĉite de via magio.

Poste sovaĝaj bestoj tra l' herbaĵ' trapetolas,
naĝas trans riveregojn hastajn : ĉiu avide vin pro
la sorĉ' sekvadas, kien gvidi vi ekas.

Fine do, ĉie, je maroj, montoj, raboriveroj, plenfoliaraj birddomoj, kamparo la verda, ĉiuj kore dotante per am' alloga, vi igas ilin ĉiujn sian idaron avide generi.

5. Fakte la kombino inter la alternado longa-mallonga kaj la galopa akcento igas ĉiun individuan verson malsimila je l' aliaj. Aŭ preskaŭ...

Sed, kiam oni legas la tradukojn antaŭajn, kiuj provis konservi la heksametron mem (ekz. en Fundamenta Krestomatio la Unua Kanto de Iliado, traduko de Kofman), tiam oni konstatos, ke tie oni uzis la vortakcentojn mem por indiki la alternadon inter longa kaj mallonga ; fakte oni miksas tie du principojn — kaj la rezulto estas, almenaŭ miaopinie, bedaŭrinda senintereso de la verso, ĝi iĝas eĉ pro la sameco daŭra... enuiga.

Nu, post ĉi simplaj vortoj miaj, mi vere esperas, ke oni sendos al mi siajn reagojn, kritikojn, konsilojn...

Gerrit Berveling.

UNIKA PERIODAĴO

MONATO

40 paĝoj — riĉe ilustrita — 11 kajeroj jare

Abono por la Francoj : 112 frankoj pere de nia Libro-Servo.
6 numeroj (junio - decembro) : 56 F.

Maison Culturelle Esperantiste
P.K. Nantes 1485 39 P

OLIMPIO : Sanktejo (legendo kaJ ritoj)

Piede de monto Kronion-o, piede de dolĉaj deklivoj, ĉe kunfluejo de Alfeo kaj Kladeos, en la freŝeco de multjarcentaj pinoj kaj olivarboj, troviĝas Olimpio. Harmonieco de la pejzaĝo, klareco de la atmosfero, ondumado de la arbaroj, inspiras serenecon.

Dum pluraj jarcentoj, OLIMPIO estis malaperinta sub 6-7 metroj da tero, alportita de la defalaĵoj de la monto kaj de la inundoj de la duriveroj.

En 1728, la abato Montfaucon, en 1767, la germano Winckermann, vane petis pri prifosajoj. En 1829, franca ekspedicio malkovris la situon de la Zeŭsotemplo, sed prirabis la ruinaĵojn ; tial oni haltigis la prifosaĵojn. De 1875 al 1881, germanaj arkeologoj elterigis amasojn da ŝtonoj kaj marmoroj. Ili estis la ruinaĵoj de Olimpio.

Olimpio neniam estis vilaĝo ; ĝi estis Sanktejo. Piza kaj Elis, la najbaraj urboj, unu post la alia regis super Olimpio. La plej antikvaj konstruaĵoj estas de ĉirkaŭ -1500. Dum pluraj jarcentoj, la invadantoj Indo-Eŭropanoj (Dorianoj, Ionanoj, Akajanoj) luktis por proprigi al si la sanktajn situojn kaj trudi sian propran Urano-kulton.

En Olimpio, la unua sanktejo estis tiu de GAIA, la Tera Diino. Estis fekundeca kulto, rilatanta al Luno, kiu donas la akvon por la kulturoj. Gaia estas triobla diino (la junulino, la nimfo, la maljunulino), kiu rilatas al la 3 fazoj de Luno. La fazoj de Luno donis la 28-tagan monaton ; el tiu luno-daŭro oni kreis la Unikan Jaron, de 364 tagoj, de 13 monatoj. Oni kultis la bovinon, kies kornoj formas Lun-arkon.

Estis matriarkeca reĝimo, en kiu la maskla parulo (frato, filo, onklo, sed plejofte la venkanto de pied-kurado aŭ de batalo), iĝinta la edzo de la Diino, estis la Sankta Reĝo,... buĉoferita al Gaia, okaze de la jaraj agraraj festoj (ŝirkolekto de visko, de glanoj, de tritiko). Tiuj festoj okazis por certigi fekundecon al la Tero, ĉiujare, en la solsticaj tagoj (kiujn laŭlonge de la generacioj, la homoj estis notintaj).

La antaŭhelena Sankta Reĝo estis aŭ dronita en lageton, aŭ disŝirita de virinoj, kiuj portis maskon de ĉevalino, aŭ trenita de ĉaro jungita je 4 ĉevaloj, ĝis morto sekvas. (Ĉevaloj kaj ĉaroj estis enkondukitaj de la Hyksos-invadantoj en Egiptujon kaj de tie en Greklandon ; antaŭe oni uzis azenojn).

Batalo kontraŭ sovaĝaj bestoj estis rita provo por la estonta reĝo, antaŭ la kronado, en Mezazio, Babilonio, kaj Grekujo. Antaŭ tiu kronado, oni ŝmiris lian vizaĝon per ruĝa ŝmiro eltirita el la koĉeniloj ; tiu ruĝa koloro restis ĉiam ligita al reĝeco.

La solsticoj duonigis la Unikan jaron : Tallô = kiu ĝermas, = Ĉarpô = kiu velkiĝas. Pli poste oni disigis la jaron en 3 kaj 4 Sezonojn. En tri-sezona jaro, leono reprezentis printempon, kaprino someron, serpento vintron (tiun tutan jaron reprezentis la Kimero, kiun oni trovis sur Hitita monumento) En la kvar sezona jaro, estis taŭro, ŝafo, leono, serpento (aŭ vulturo aŭ skorpio). Teorie, la sankta reĝo, kiu estis superfortinta la bestojn, ricevis Povon super la sezonoj, kiujn li tial regis. La sankta reĝo, ĉiujare, estis anstataŭita de alia.

La Akajanoj enkondukis la Grandan Jaron : ĝi komenciĝis ĉe la vintra solstico, kiam la pozicio Luno-Suno estis vera Edziĝo Luno-Suno. Tiu Granda Jaro daŭris 100 luno- daŭrojn. Pli poste oni disigis



La Templo de Hera en Olimpio

tiun ĉi jaron en 2 olimpiadojn, ĉiun de 4 jaroj. La sankta reĝo ricevis permeson vivi dum tiu tuta Granda Jaro. Sed, ĉar oni devis ĉiujare kulti la Teron kaj fari oferon, la reĝo trovis Anstataŭanton, unu fojon el du. Estis unue la Duulo, la Alter Ego, kvazaŭa ĝemelo pli juna. La reĝo estris la armeojn, gvidis la migradojn. Dume, la Duulo estis la religia persono kondamnita al buĉofero. Kompence li ricevis la Or-promon, simbolon de senmorteco. Poste estis junulo, kiu anstataŭis la reĝon ; la lastan tagon de la jaro, la reĝo sin kaŝis en tombejon ; la junulo prenis liajn vestojn, liajn insignojn edziĝis al la diino ; la morgaŭon oni lin oferis al Gaia ; la reĝo reaperis por denove peti sian tronon (en Arkadio, ankoraŭ komence de la kristana erao, oni oferbuĉis junulojn, kiujn manĝegis homoj aŭ la sanktaj korvoj).

Kiam la Akajanoj atribuis totemon al la sanktaj reĝoj, estis la totema besto, kiun oni oferis al la diino.

La unuaj invadantoj instaliĝis en Tesalio kaj centra Grekujo. Ili, vole nevole, edziĝis al la lokalaj pastrinoj kaj naskigis infanojn. Tiuj akajaj ĉefoj iĝis la sanktaj reĝoj de la kverko aŭ de la frakseno ; tiuj arboj altiras fulmon kaj pluvon ; ili figuris, en la tuta Eŭropo, en popularaj ceremonioj, kiuj petis pluvon aŭ honoris fajron. Ili nomis tiujn ĉefojn : Zeŭso aŭ Pozidono ; tiuj nomoj estis titoloj : Pozidono signifas : tiu, kiu donas la akvon al la sankta monto ; Zeŭso signifas = luma ĉielo.

En la 13-a jarcento la Akajanoj trudis Uranon, la dion de la ĉielo kaj alportis la patriarkecan reĝimon.

Urano estas la maskla formo de Ur-Ana, la hinda diino de « la somero, de la vento, de la sovaĝaj bovoj ». Estas Varuna, la veda paŝtisto, dio de Hindujo. La Akajanoj igis Uranon la Origina Patro kaj Zeŭson-Pozidonon Senmortemuloj, al kiuj ili donis la fulmon. Ĝis tiam la fulmo apartenis al la diino Rhea kaj estis malpermesita al la maskloj ; la Kreta duobla hakilo ĝin simbolis. Nur poste, Pozidono, adorita de la maristoj, ricevis tridenton. La Patriarkeca reĝimo trudiĝis nur post longaj bataloj, kiuj estis la bazo de la mitologio.

Urano ne figuras sur la grekaj skulptaĵoj kaj ceramikoj.

En Olimpio, la monto Kroniono estis konsekrita al Krono : Gaia la Tero edziniĝis al Urano la ĉielo : Naskiĝis la Hekatonkiroj, la Ciklopoj, la Titanoj.

La Hekatonkiroj : (Cottos, Gyges, Briarée), la Gigantoj kun cent brakoj estis probable la militistoj arigitaj centope ; aŭ ili obeis kolegaron de 50 pastrinoj. Ili loĝis en la nordaj montoj de Grekujo.

La Ciklopoj (kun cirkligita okulo) estis korporacio de forĝistoj ; ili protektis unu sian okulon kontraŭ la fajreroj ; ili tatuis sur sia frunto, cirklan simbolon de suno, kiu donas la fajron ; ili sciis uzi la cirkelon por limsigni la vazojn, la kaskojn, la ritajn maskojn.

La Titanoj estis diaĵoj babilonaj kaj palestinaj, enkondukitaj en Grekujon de la invadantoj. Ili estis la unua Dia Generacio. Ili regis super Luno, Suno kaj la 5 planedoj tiam konataj kaj super la tagoj de la semajno. Ili estis Oceano, kiu estras la akvon, Jafet patro de Atlas kaj Prometeo, Helios la suno, Krono patro de la Olimpanoj. La Grekoj aldonis la Titaninojn : Rhea la Tero, Temisa la Justeco kaj unua sibilo de Delfo, Tetisa la patrino de Akilo, Mnemosinea patrino de la 9 muzoj.

Sed Urano volas esti la mastro kaj ĵetas Hekatonkirojn kaj Ciklopojn en la Tartaron, plej profunde en la Tero.

Krono anstataŭis Uranon

Gaia, furioza, donas al Krono la ŝtonan falĉileton por kastri kaj mortigi Uranon.

Kastrado-mito estis alportita de la Hititoj ; ĝi ankaŭ ekzistis en Libio (kies kulto pri kverko estis ligita al tiu de Dodono). La neolitikaj ritaj falĉiletoj el osto, plifortigita per siliko kaj obsidiano, servis por fortranĉi la viskon de la kverko aŭ la unuan garbon de tritiko ; ankaŭ la masklajn organojn. (Kelkaj triboj ankoraŭ hodiaŭ kastras siajn malamikojn).

En Olimpio, Krono estis honorita ĉe la supre de la monto Kronion, kie troviĝis lia altaro, kien oni alportis oferaĵojn.

Krono edziĝis al Rhea, la Titanino, sia fratino, kiu restis tute potenca. Naskiĝis Hestia, Pozidono, Hera, Demeter, Hades, Zeŭso. Krono estas la sankta reĝo ; lia nomo signifas Korvo, orakola birdo. Kiel Moloch, kiel Baal, li rite « manĝegis siajn infanojn », por resti reĝo.

Sed Rhea savas Zeŭson, kiun ŝi konfidas al la Kuretoj (la Kouroi) kiuj lin kaŝas en groton. Ili estis la junuloj, kiuj akompanis la reĝon ; la klaktintado de iliaj armiloj forĉasis la malbonajn spiritojn. Ili estis Kretaj.

Zeŭso anstataŭas Kronon

Hades, Pozidono kaj Zeŭso triumfas super Krono ; forĵetinte la Titanojn (kiuj estis helpintaj Kronon) en la Tartaron, deviginte Atlas-on porti la ĉielon sur siaj ŝultroj, forĉasinte Kronon, ili instaliĝas sur la monto Olimpo. Tallos, historiisto de la unua jarcento, skribis, ke tiu milito daŭris 10 jarojn ; estis tiu, kiun la Akajanoj gajnis super la Tesalanoj : tiu Titanomakio ilustris la frontonojn de Olimpio (nun en la muzeo). Estas la triumfo de la Patriarkeco super la Patrinoj-Diinoj.

HERA

En Olimpio, kiel alie, ĉiu dio havas sian propran sanktejon, sur kiu la homoj konstruis templojn pli kaj pli belajn. Unu el la plej antikvaj temploj estas tiu de Hera, Titanino, fratino kaj edzino de Zeŭso. (En tiu templo oni honoris Gaia, Rhea, ŝiajn avinon kaj patrinon).

Antaŭ la helenaj invadoj, Hera (kies nomo signifas la Protektantino) estis en Samos kaj Argos la triobla diino de la Luno (Selena Afrodita kaj Hekata). Ŝi estis ankaŭ diino de la kalendaro ; ŝi figuris kun la printempa kukolo kaj kun la aŭtuna granato, kiu anoncas la morton de la jaro. La mita edziĝo, kiun Zeŭso perfortis al Hera, memorigas la superregadon de la Diino. Figuretoj el orfolioj, trovitaj en Miceno, reprezentas nudan argan diinon, kiu tenas kukolon. Estas la bildo de la invadantoj, kiuj unue alvenis kiel « timantaj kukoloj », akceptis servi en la reĝina gvardio, sed poste instigis palacajn revoluciojn kaj kaptis la regadon. Knossos estis dufoje disrabita en -1700 kaj -1500 ; Miceno falis unu jarcenton pli poste. La legendo rakontas, ke Zeŭso transformita en kukolon perfortis Hera.

Okaze de tiu edziĝo, Hera ricevis de Gaia, la Or-poman arbon por sia ĝardeno de la Hesperidinoj. Al Hera, patrino-diino, oni buĉoferis la sanktan reĝon al kiu oni promesis senmortecon. La animo de la heroo gajnis la Paradizon, situan transe de Norda Vento (Hiperboreujo aŭ Ĝardeno de la Hesperidinoj). Por eniri en tiun paradizon (tiun ĝardenon) paspermeso estis necesa : estis la Or-pomo.

Oni diris, ke la edziĝa nokto de Hera — Zeŭso daŭris 300 jarojn ; Tio certe signifas, ke 300 jaroj estis necesaj por trudi monogamion — kaj ĉeson

de la oferbuĉoj — al la popolo de Hera. De tiam Hera estis reprezentita kiel la Protektantino de la edzino, de la monogamia edziĝo ; ĉie oni celebris la Sanktan Edziĝon, kiun simbolis lignaj statuoj. Sed la legendo montras ŝin ĵaluza kaj kverela edzino ; ŝi sin kruele venĝis kontraŭ la malfidelaĵoj de Zeŭso, persekutante liajn komplicinojn (Alkmena, Kalista, Eŭropa, Ioa, Inoa, Semela, Ehoa) kaj iliajn infanojn.

Hera estis patrino de Areso, dio de la milito, de Hebe la juna vinversistino de la Olimpanoj, de Ilitia, kiu prezidis la naskiĝojn. La mito certigas, ke, sen interveno de Zeŭso, ŝi naskis Hefeston kaj Tifonon.

Hefesto « tiu, kiu brilas dum la tago », dio de la fero, de la metaloj, de la vulkanoj, de la ciklopoj, ŝajne estis suna duon-dio, unu Sankta Reĝo. Li estis malbela, lama, kun malbona karaktero. Sed li estis potenca ; li fabrikis la fulmojn de Zeŭso, la tridenton de Pozidonon, la kaskon kiu igis Areson nevidebla, la sagojn de Apolono kaj Artemisa, la armaĵon de Akilo, tiun de Eneo, la ĉenojn kiuj enĉenigis Prometeon sur la monto Kaŭkazo. Li edziĝis kun Afrodita, kiu adultis lin kun Areso.

Hefesto, la lama forĝisto estas tradicio, kiun oni retrovas en landoj tre malproksimaj, kiel centra Afriko kaj Skandinavio. La malkovro de fero, de bronzo, kaj la enorma potenco, kiun ili donis al tiuj, kiuj ilin posedis, estas la bazo de tiu kulto. La metalurgio eniris en Grekujon transe de la Egeaj Insuloj. Oni ankaŭ importis fajne ĉizitajn oron kaj bronzon. La lama forĝisto estis gardita en groto — eble intence kaptita kaj kripligita por ke li ne portu alien siajn teknikojn.

Frutempe Hera ĉesis esti nur Protektantino de la edziĝo ; ŝi havis gravan rolon en la militaj ritoj. Sur la skulptajoj ŝi havas kronon aŭ diademon kaj tenas sceptron. Nobeloj kaj ĉefoj ŝin respektis ; ŝiaj venĝoj estis kruelaj ; Pariso, Trojano, devis elekti la plej belan inter Atena, Hera kaj Afrodita ; li elektis tiun ĉi lastan ; por sin venĝi Hera partoprenis la detruon de Trojo).

La templo de Hera en Olimpio, estas unu el la plej antikvaj de Grekujo, konstruita en -650. Origine la kolonoj estis el ligno ; iom post iom, oni ilin anstataŭigis per ŝtonaj kolonoj, kies stilo variis laŭ la epokoj : Kapitelo arkaika (dorika plat-panforma) klasika (galba), romia (kun rekta ekino). Estas dorika templo longa kaj mallarĝa (sur la larĝo 6 kolonoj kaj 16 laŭ la longo). La muroj estis el krudaj brikoj, sur ŝtona soklo. En la naoso unu kolono el du estis kunigita al muro per vando ; tio montras grandan antikvecon. Estas en la templo de Hera ke oni trovis la belan statuon de Hermeso, nun en la muzeo.

ROBERTO BURNS

populara poeto popola

Lastatempe mi legis en revuo artikolon, kiu aludis al « kulto de Bruns ». Ĉu vere estas kulto pri tiu skota poeto, kiu mortis antaŭ preskaŭ 200 jaroj ? Kaj se ja ekzistas kulto, kial ?

Laŭ la statistiko sole, Burns (Beŭrns) montriĝas kiel fenomeno pli ol poeto : la Burns Federacio entenas 950 klubojn, disajn tra la tuta mondo, kaj kies membroj nombras pli ol unu milionon ; ĉiun jaron ĉirkaŭ la datreveno de lia naskiĝo, oni taksas, ke pli ol 500 000 specialaj festenoj (Burns vesper-manĝoj) okazas tra la tuta mondo. La formo de tiuj festenoj estas ankaŭ aparte speciala : la ĉeestantaro manĝas hagison (grandan kolbason), alportitan en la salonon kun granda ceremonio kaj akompanatan de strida muziko far sakŝalmo (skota blovinstrumento) ; iu deklamas honore al la poeto per « La Senmorta Memoro » ; viro tostas « la sinjorinojn » kaj fraŭlino ĝentile respondas ; oni kantas kaj ĉiuj dancas vigle. Tiuj, kiuj ne konas la morojn, povas facile opinii, ke estas kulto — eĉ pagana — pri Roberto Burns.

Burns naskiĝis la 25an de januaro 1759 en modesta loko — argila dometo apud Ponto Doon (Dun), Ayrshire (Graflando de Ajr), Skotlando. Li diris, ke li ŝuldas multe al iu maljunulino, kiu estis « rimarkinda pro siaj senscio, kredeblo kaj superstiĉo ». Ŝi evidente kultivis en li la latentajn semojn de poezio kaj ŝi ankaŭ forte afektis lian imagon. Lin krome influis la historio pri William Wallace (Vilhelmo Vales), kiu vivis pli ol 400 jarojn antaŭe. Tiu historio « ...verŝis skotan antaŭjuĝon en miajn vejnojn, kiu bolados tie ĝis la kluzoj de la vivo fermiĝos en eterna ripozo ».

Tio montras al ni unu el la trajtoj de la poeto, ĉar li estis patrioto en la plej bona senco de la vorto. Poste li verkis kanton, kiu fariĝis preskaŭ batal-himno por skotoj :

Skotoj, kiuj sangis

Skotoj, kiuj sangis kun
Vales 1, jam por Brus 2 -plenum',
Ek al morta lito nun
    Aŭ ĝis la venkad' !
Jam la tago, hor-komenc' ;
Nubas fronto de l' atenc',
Edvard 3 venas kun potenc' —
    Sklavoj en degrad' !
Kiu do perfidos nin ?
Malkuraĝos je la fin' ?
Aŭ sklaviĝos sen estim' ? —
    Fuĝu for de mi !
Kiu estas por la kron',
Prenos glavon laŭ ordon',
Staros kontraŭ la opon',
    Do min sekvu li !

---

1. Vales (Wallace) — skota heroo, kiu luktis kontraŭ la angloj.

2. Brus (Bruce) — skota reĝo, kiu venkis la anglan reĝon Eduardo ĉe la batalo de Banokbeŭrn (Bannockburn) 1314.

3. Edvard (Edward) — reĝo Eduardo 11 de Anglujo.

Pro la ĝen de persekut'
Pro la filoj en servut',
Sangos ni ĝis lasta gut',
Sonu liber-kri' !
Uzurpistoj de fifam',
Kaj tiranoj falu jam !
Liberec' en batal-flam' ! —
Devon faru ni !

Precipe kiam oni aŭdas tiun kantata, oni konstatas, ke pro tiu sola poeziaĵo, Burns restos eterne en la memoroj de skotoj.

Sed la poeto ĝuas internacian renomon, kaj mi enkonduku nun liajn plej ŝatatajn verkojn — ampoemojn kaj amkantojn, kiuj ja estas universale laŭdataj. Ekzistas multaj tre bone konataj ampoemoj, sed jen estas unu, kiun oni ne tre ofte deklamas :

o0o

La bluokula fraŭlino

Laŭ malgaja pado vagis
Mi hieraŭ, kaj domaĝe ;
Du okuloj trafe agis,
Belis bluo elvizaĝe.
Estis ne la bukloj oraj,
Lipoj rosmalsekaj roze,
Nek la manoj flor-marmoraj,
Sed l' okuloj blu-etose.

Ŝi ridetis, min enretis,
La animon ravis tiom ;
Morta vundo, ja inundo,
Okulfrapis bela bluo.
Sed ne klaĉon ! nek prokraston !
Eble ĵur' efikos iom ;
Se rifuzo en malnaskon
Pelos la okula bluo.

Tiaj poemoj abundas kaj spegulas unu el la ecoj de Burns — forta amo al la ina sekso. Fakte, pro liaj amoraĵoj, lin publike kaj akre kritikis la loka eklezio, la t.n. « presbiteraro », kiu en tiu epoko posedis grandan potencon. Kaj Burns ne kaŝis siajn amor-tendecojn, nek hezitis alpaŝi maldecon en siaj verkoj. Legu :

o0o

La fraulino, kiu preparis la liton por mi

Vent' de januar' fridblovis
Dum mi paŝis al la nordo,
Nigra nokto min envolvis ;
Ne bonvenis loĝo-pordo.
Sed fraŭlinon ŝanc-agrable
Ekrenkontis mi ĝenita,
Kaj invitis ŝi afable
Min al ĉambro eskvizita.

Riverence mi piedis,
Dank' al la komplezo de ŝi ;
Riverence ankaŭ petis,
Ŝin prepari liton por mi.
Manoj blankaj en preparo
Sternis tolojn senĉifone ;
Ŝi min tostis el pokalo,
« Nu, junulo, dormu bone ».

Ŝi ekprenis la kandelon,
Kaj foriris ŝi rapide,
Sed mi haste ŝin revokis,
Meti pli da pufo lite.
Ŝi respekte serv-kondutis,
Kaj aldonis kusen-molon ;
Mi per kiso ŝin salutis,
Brakumante ŝian kolon.

Ŝi ekdiris, « Senmanigu !
Kaj ne agu malĝentile ;
Se vi amus min subtile,
Mian virgon ne atencu ! »
Ŝiaj haroj ĉenis ore,
Dentoj ja ebur-similis,
Vangoj vinis liliflore,
Kaj ŝi por mi lit-preparis !
Ŝia brusto belis kvazaŭ
Du amasojn neĝajn vidi ;
Ŝiaj membroj mamor-ŝtonaj,
Kaj ŝi lit-preparis por mi !
Mi kisadis ŝin multofte,
Kaj silente ŝi feliĉis.
Ŝin mi metis kontraŭ muron —
Ĝis tagiĝo ŝi distriĝis.

Je morgaŭo, leviĝante,
Ŝin mi dankis pro l' komplezo ;
Ŝi ruĝiĝis kaj suspiris,
« Min detruis via lezo ! »
Brakumante mi ŝin kisis,
Dum okule brilis larmo.
Diris mi, « Ne ploru, kara,
Ĉiam servos via ĉarmo ».

Tolojn de patrin' ŝi prenis,
Kaj ĉemizojn do el ili,
La fraŭlino faris por mi ;
Restu gajo, ĝojo ĉe ŝi !
Ĉar preparis liton por mi,
Tiu belulin' — ja por mi !
Mi memoros ĝis agoni',
Tiun, kiu servis por mi.

Tamen en tiu vervaĵo ni konstatas alian karakteraĵon, kiu famigis Burns ; li plene, vigle, ĝoje ĝuis la vivon. Relegu supre kiel li priskribas la afekton de la belulino je si. La versoj pulsas per la anima plezurego kiel kapablas priskribi nur homo, kiu mem spertis tian ĝojon.

Se la ampoemoj estas delikataj, liaj satiroj estas mordaj, acidaj kaj eĉ kalumniaj, ĉar la priskribitoj identiĝis tiutempe sufiĉe facile. Unu el la plej bone konata el tiuj satiroj estas « La preĝo de pia Vilĉjo », kies akra sarkasmo estas la plej brila iam verkita. Tiu poemo, kune kun aliaj plejŝatataj verkoj aperas en « Robert

Burns — kantoj poemoj kaj satiroj » tradukitaj de Reto Rossetti kaj William Auld. Tamen, unu tian satiron mi tre amas, pro ĝia blaga, preskaŭ senreala karikatureco :

o0o

Edzinon Kian Havis Vil'

Nu, Vilĉjo Vasel 1 loĝis jen,
Ĉe Tvid 2, aŭ ĝuste, Linkum-dodi 3 ;
Teksisto bona estis li,
Sed drapon eblis li marodi :
Moroza estis la edzin',
Ŝi havis, do, cigan-patrinon :
Edzinon kian havis Vil',
Valorus ŝi eĉ ne butonon.

Okulon solan havas ŝi —
Ripetojn du la kat' posedas —
Kvin rustajn dentojn, stumpo krom,
Kaj lango ŝia klake tedas ;
Etbarbo ĉirkaŭ ŝia buŝ,
La naz' minacas la mentonon :
Edzinon kian havis Vil',
Valorus ŝi eĉ ne butonon.

Ŝi estas kurba ĉe la krur' ;
Krom kripla, kurta ĉe la mano ;
Tordita dekstre estas ŝi,
Maldekstre estas eĉ la samo ;
Ŝi havas ĝibon sur la brust',
Ĉe l' ŝultro havas ŝi ŝablonon :
Edzinon kian havis Vil',
Valorus ŝi eĉ ne butonon.

Maljuna Bodrans 4 ĉe l' kamen',
Purigas mane la vizaĝon ;
Ne agas tiel la mastrin',
Por buŝo uzas ŝtrumpaĉon ;
La pugno, kiel sterko-korb' ;
Vizaĝo ŝia kaŭzus vomon :
Edzinon kian havis Vil',
Valorus ŝi eĉ ne butonon.

Bonŝance al Burns la leĝo kontraŭ kalumnio ne estis tiel rigora kiel ĝi estas hodiaŭ. Tamen, la sekvaj du epitafoj apenaŭ mokas, pli laŭdas la mortintojn :

Epitafo por William Michie
(Vilhelmo Mihi)
lernejestro de Cleish
(Klis)
Paroho, Fifeshire
(Graflando de Fajf)

Jen kuŝas l' ostoj de Vil' Mihi :
Ho, Satano, ilin prenu !
Klerigos viaj idoj de li,
Kaj diable pli konvenu !

Epitafo por William Nicol
(Vilhelmo Nekol)
de la liceo, Edinburgo

Larvoj, manĝu ĉe la cerbo
De Nekol, ja bankedo !
El la koro, unge, ĉerpo !
Ĉar enas aĉa eto.

Do, ni vidas, ke Burns estis verkanto de kantoj, kiuj kapablas inspiri krom kortuŝi la aŭskultantojn. Tiujn kantojn li ofte adoptis de folkloraj melodioj. Burns ardis eĉ tiom en siajn ampoemoj, kaj ĉiu amas amanton, ĉu ne ? Li verkis satirojn, kiuj pikis la malfortojn, ruzon kaj trompaĵojn de homoj. Ĉion li verkis simple, elegante laŭ la lingvo de la kamparanoj.

Sed tio ne estis ĉio. Burns ankaŭ estis filozofo, kiu pensadis profunde pri la maljusteco kaj krimoj de la homaro : « Kion faris homo al homo ! ». Li amis ne nur la sinjorinojn ; li amis ĉiujn kreaĵojn de Dio. Legu fine unu el tiuj poemoj, kiu ne kapablas esti nesincera. Laŭ mi, tiu lasta cito montras al ni kial « kulto » fondiĝis ĉirkaŭ tiu poeto kaj ties verkoj.

La vundita leporo

Homo malhumana ! velku malbenite
La okul' barbara, jam celinte murdon ;
Malkompato rekompencu vian ŝuldon,
Kaj la kor' kruela malĝojiĝu kvite.

Vivu ! kompatinda vagant' de l' arbaro
Dum l' amara eto de l' cetero viva ;
Ne plu vin regalos vepro primitiva,
Nek verdaĵoj nutros vin en malavaro.

Serĉu ! vundaĉito, ejon el danĝero,
Jam ne ripozejo, sed nun angor-lita ;
Per siblantaj junkoj, via kap' ŝirmita ;
Sangan bruston premu al malvarma tero !

Ofte, cerbumante laŭ rivera bordo,
Salutante la krepuskon elegantan,
Mi maltrafos vin rosherbe petolantan ;
Kaj malbenos la friponon via sorto.

A. MOLLISON.

En la originalo, titolita 'Sic a wife as Willie had' —

1. Willie Wastle.

2. Tweed — rivero en la landlima regiono de Skotlando.

3. Linkum-doddie.

En la originalo —

4. Baudrans — la kato.

POR VIA DISTRO

SOLVOJ DE LA ANTAŬAJ PROBLEMOJ

Ĉu estas eble ?

Tiu frazo ne estas korekta : La razisto ne sin razas ĉar li razas ĉiujn virojn kiuj ne sin razas. Li ne estas razita de alia ĉar, en la vilaĝo, ekzistas nur du kategorioj de viroj : tiuj kiuj sin razas, kaj tiuj kiuj estas razitaj de la razisto. Konklude, la razisto ne estas razita. Do, la unua parto de la frazo kiu diras ke neniu viro portas barbon ne estas ebla. (Tiu problemo esti proponita de la filozofo Bertrand Russel).

Al kiu apartenas la zebro ?

Estu 1 2 3 4 5 la numeroj maldekstre dekstren de la 5 domoj. Ni scias :

La Norvego loĝas en 1 (propono 10).

La dua domo estas blua (proponoj 15 kaj 10).

Oni trinkas lakton en la tria (propono 9).

La verda domo staranta dekstre de la ebura kaj la angla domo estante ruĝa (proponoj 6 kaj 2), la unua domo estas flava.

Do la « Gauloises » fumanto loĝas en la unua domo (propono 8).

La ĉevalo estas en la dua (propono 12).

Laŭ la proponoj 4, 5, 9 kaj 13 *la Norvego trinkas akvon.*

La unua domo estante flava, la dua blua, la verda starante dekstre de la ebura, la tria domo nur povas esti ruĝa aŭ ebura.

SE la tria domo estas ebura ni havus :

La verda domo en 4 (propono 6).

La kaftrinkanto en 4 (propono 4).

La 5a domo estas ruĝa kaj la Anglo loĝas en ĝi (propono 2).

La rusa tetrinkanto devus loĝi en la 2a domo kaj la « Lucky Strike » fumanto trinkante oranĝan sukon loĝus en la 5a aŭ inverse.

Do la « Old Gold » fumanto povus nur loĝi en la 3a aŭ la 4a domo. Tio malhelpas loki la Hispanon kaj lian hundon, lokinte la Japanon kaj liajn « Gitanes ».

Do, la tria domo estas ruĝa kaj la Anglo loĝas en ĝi (propono 2).

La 4a domo estas ebura kaj la 5a verda kaj oni trinkas kafon en ĝi.

La 2a povante esti loĝata nek de la Japano ĉar neniu trinkaĵo estus ebla en tiu domo, nek de la Hispano pro la hundo, apartenas al la Ruso.

Do la « Lucky Strike » fumanto loĝas en la 4a domo, la Japano, « Gitanes » fumanto, en la 5a, la Hispano kaj la hundo estas en la 4a, la helikoj kaj la « Old Gold » fumanto en la 3a, la « Chesterfield » fumanto en la 2a, la vulpa proprietulo en la 1-a kaj la zebra proprietulo en la 5a.

Do *la zebro apartenas al la Japano.*

DIVIDO PRESKAŬ SEN CIFEROJ

Oni devas rimarki ke estas 7 ciferoj je la dividota nombro, 2 je la rezulto, kaj 5 je la dividanta nombro (kun 8). Sub la dividanta nombro estas nur tri substraktoj kaj du foje oni devis preni du cifero jn. La dua kaj kvara ciferoj de la rezulto estas do 0. Se oni multoblas la dividanton per 8 oni trovas duciferan nombron. La dividanto estas pli malgranda aŭ valoras 12. Sed la dua cifero de la rezulto multobligita per la dividanto estas tricifera nombro. La dividanto povas esti nur 12 kaj la lasta cifero de la rezulto 9. La unua cifero de tiu rezulto ankaŭ estas 9. La unua cifero de tiu rezulto ankaŭ estas 9 ĉar multobligante ĝin per 12 oni trovas nombron kun tri ciferoj. Oni povas retrovi la dividotan nombron jene (90 809. 12) + 1 = 1 089 709.

KRISTNASKAJ DONACOJ

Je la unua vido, ŝajnas ke tiu problemo ne estas korekte proponita : mankas precizigo. Sed oni devas rimarki ke, kiam oni diras ke unu el la nepinoj ricevas la duonon de la sumo ricevita de la du aliaj ambaŭ, tio signifas ke la aĝo de la plej juna estas la duono de la sumo de la aĝoj de la du aliaj. Estu a, b, c tiuj tri aĝoj. Je iu dato, oni havas : b = (a + c) /2, aŭ 2b = a + c. kelkaj jaroj poste aŭ antaŭe, la aĝoj de la nepinoj estos a + k, b + k, c + k kaj oni povas skribi (a + k) + (c + k) = 2 (b + k).

Ni diru ke en la unua jaro kiam la avo decidis fari tiujn donacojn la aĝon de la plej juna estis y kaj la aĝo de la dua x. Laŭ unua konstato, la aĝo de la plej maljuna estis x + y, laŭ la dua konstato oni povas skribi 2x = y + (x + y), tio estas x = 2y. de la tri nepinoj estis y, 2y, 3y jaroj. La nombro da 5-stelaj moneroj ricevitaj tiam estis do 6y (laŭ la tria konstato), kaj la nombro da jaroj inter la unua jaro kaj la lasta kristnaska festo estis la du trionoj de tiu nombro, t.e. ; 4y jaroj. La aĝoj de la tri nepinoj dum la lasta kirstnaska festo estis do 5y, 6y, 7y jaroj. Unu el ili estis 21 jara, kaj y devas estis entjero, do la nura valoro ebla por y estas y = 3.

Dum la lasta kristnaska festo la aĝoj de la tri nepinoj estis : 21, 18, 15 jaroj.

HISTORIETOJ (I. Nagy)

En Venecio /Italio/ mortis la avo. La parencaro kunvenis por pri-paroli la enterigon, kun la enterigisto. Li diras, ke la unua klaso kostas dekmil, la dua klaso sesmil kaj la tria klaso trimil lirojn. La parencaro interdiskutas kaj demandas : « Ĉu ne estas pli malmulte- kosta tarifo ? » « Kompreneble estas — respondas la oficisto de la entombiga entrepreno — la kvara klaso. « Kaj kia ĝi estas ? » « La gefunebruloj sekvas naĝe la ĉerkon ».

La ŝtuparejo estas tre malhela. Esceptokaze la edzo alvenas pli frue ol laŭkutime. Li sonorigas kaj kiam la pordo malfermiĝas, en la mallumo, la edzo, kredante vidi la belan, junan ĉambristinon, ĉirkaŭbrakumas kaj kisas ŝin. La edzino post la kiso : « Ĉu vi freneziĝis, ke vi venas tiel malfrue ? Ja, mia edzo povas veni ĉiumomente ».

GRAMATIKO PER BONHUMORO

◆◆◆◆

SUR

Prepozicio montranta :

POZICION :

1) **de estulo aŭ objekto, kiu estas pli alta ol alia** kaj tute aŭ parte **ĝin tuŝas :** ripozi sur herbejo, mensogoj sur mensogoj, nuboj sur lia frunto.

2) **de estulo aŭ objekto lokita en libera loko :** promeni sur la strato ŝipo sur la horizonto.

RIM :

kiam la loko estas vasta, oni povas uzi EN : labori en haveno, sur la kajo.

3) **de influo, efiko sur io aŭ iu :** beno sur lia kapo.

TRANSLOKIĜON - DIREKTON :

kun uzo de la **akuzativo N :** verŝi akvon sur florojn- fali sur la teron- iri de strato en straton -preni sur sin la respondecon -direkti sian rigardon.

RIMARKOJ

ĉe la superlativo, oni povas uzi SUR : tiu varo estas la plej profitdona sur la merkato.

SUR :

uzata kiel prefikso de verbo igas la lokadjekton rekta komplemento : suriri monton- surjeti iun per ŝtonoj — surverŝi florojn per akvo.


◆◆◆◆◆◆

Almovo :



Jam de unu momento mi pensas, ke io, ĉi tie, ŝanĝiĝis. Ha ! mi memoras : granda bela vazo surstaris tiun rondan tablon ; ĉu vi ĝin translokiĝis ? Mi esperas, ke malbona sorto ne falis sur ĝin !

Bubaĵo !



Bubo ! Bubo ! Tuj revenu !...

Ne, ne, kaj ne ! Neniam plu mi tenos cin sur miaj genuoj por cin dorloti !

◆◆◆◆◆◆◆

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (160 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (280 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (4,80 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (50 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (35 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk Frankfurt (M) 2347 59-601 (18 mk.).

Hispanujo : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 42-10° - D ALICANTE (650 pes.).

Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (10 us. dol.).

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Benedetto Alfieri, 24, 28100 NOVARA — p.ĉ. 23/16532 (7000 liroj).

Japanujo : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2 400 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (10 U.S. dol.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL. ZH pĉk 209721 (20 guld.).

Norvegujo : S-ino Louise Bœ Maridalsveien 128 A OSLO 4.

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima) (10 us. dol.).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (10 us. dol.).

Svedujo : ESPERANTOFORLAGET, Fack. 200 42 MALMO 7, ĝiro 578 (35 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (20 fr.).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (10 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 10 us. dol. aŭ 25 internacia respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — N° C.C.P.P. 36.258 Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 3-4 de 1980, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

« Mi telefonas de Madrid, Téhéran, Göteborg... Tours ». Le nombre de réservations par téléphone est en augmentation. Cela pose un problème, un de plus, car il semble bien que beaucoup d'espérantistes, en particulier étrangers, pensent trouver pour leur répondre une permanence, c'est-à-dire une structure commerciale qui n'existe pas, qui ne peut pas exister. Cette méconnaissance du mode de gestion de la Maison culturelle se fait d'autant plus sentir que sa réputation s'étend dans le monde entier vers des personnes dont les voyages à l'étranger se réalisent la plupart du temps à travers des structures commerciales. Cela nous oblige au début de chaque stage à faire des mises au point pour éviter des malentendus. La feuille explicative remise aux nouveaux arrivants ne semble pas suffire. Peut-être faut-il envisager un texte court sur le fonctionnement de la Maison culturelle, texte qui serait joint à toute réponse à une demande de renseignements, et même envoyé aux groupes et fédérations en même temps que le programme de nos activités ?

Que le renom de la Maison culturelle se répande de plus en plus, nous ne pouvons que nous en féliciter, même si cela entraîne l'apparition de problèmes nouveaux. Cela signifie qu'un nombre grandissant d'étrangers visite Grésillon, à toutes les périodes, et que l'atmosphère de tous les stages est de plus en plus internationale. L'an dernier, pour la première fois, le nombre des des étrangers a été, pendant un stage, plus important que celui des Français. Cela risque de se reproduire cette année encore.

Le jeu très compliqué qui consiste à donner satisfaction au plus grand nombre de demandes se poursuit cette année, toujours aussi pénible. Ce jeu nous oblige à une correspondance importante pour proposer des conditions de logement qui ne sont pas tout à fait celles demandées. Il est bien difficile de refuser à une famille qui désire faire un séjour de deux ou trois semaines parce que toutes les chambres sont prises, certaines pour une semaine seulement à la même période. Cela nous oblige à des réajustements et à un échange de lettres. Tout serait si simple si tout le monde avait le désir et surtout la possibilité de rester pendant un stage complet. Mais nous savons bien que cela ne se peut pas. Il nous reste à faire appel à la bonne volonté et à la solidarité de certains. Merci à tous ceux qui nous comprennent.

P. BABIN.

INTER NI

Ni pli kaj pli ricevas telefonvokojn el ĉiuj kontinentoj por rezervado de ĉambroj. Ŝajnas ke la vokantoj pensas ke ili trovos komercan strukturon por respondi. Estos necese verki teksteton klarigantan la funkci-sistemon de nia Esperanto-Domo. Tiu teksteto estos sendita al ĉiuj informpetantoj.

La tri diversaj someraj periodoj fariĝas pli kaj pli internaciaj. Lastan someron, la nombro da nefrancaj ĉeestantoj dum tempo superis la nombron da francoj.

FONDUSO FOTOKOPIILO

Total précédent :	2.849,60
Mme Clerc	100
Mme Ledan	100
Mme Chagnoux	100
Nouveau total :	3.149,60

NOS JOIES

Le 22 avril est né, à Sens, Fabien Gillet, troisième petit-fils de notre amie Marcelle Turin. Félicitations aux parents, à la grand-mère, et tous nos vœux à Fabien.

NOS PEINES

Nous avons appris le décès de notre ami Volpelière, de Nîmes. Que son épouse, bien connue des espérantistes et des Citoyens du Monde trouve ici le témoignage de toute notre sympathie.

Pour vos lectures d'été,

Pour animer vos réunions de groupe
à partir de textes vivants,
et magnifiquement traduits,

NORMANDAJ RAKONTOJ

de Guy de MAUPASSANT
traduit par Roland DUPUIS

210 pages, relié pleine toile,
illustrations originales
de Robert A. Pinchon

PRIX : 36 Francs
— Réduction à partir de 3 exemplaires —

APPEL

Plusieurs amis ont répondu à notre appel concernant « La Nica Revuo » et, grâce à eux, notre bibliothèque possède maintenant tous les numéros parus de cette revue de valeur.

Par contre, aucune proposition ne nous a été faite concernant « La Pirato ». Voici quels sont les numéros qui nous manquent :

1a jaro, nos 2, 3, 4, 5
2a jaro, no 2
3a jaro, no 4

Merci à ceux qui pourraient nous aider à compléter la collection.

NOTRE LIBRO-SERVO
EST OUVERT
PENDANT TOUT L'ETE
Vous pouvez commander par téléphone
16-41-89-10-34

Conseil d'administration du Dimanche 22 Juin 1980

La séance est ouverte à 10 heures sous la présidence de M. Babin.

Sont présents : Mmes Cheverry, Mathé, Micard ; MM. Boyet, Bénistant, Ciret, Dairon, Métivier, Prévot.

Se sont excusés : Mme Vincent, MM. D. Babin, Bodereau, Chevalier, Guillot.

STAGES PASSÉS :

Les passages organisés par le Comité d'expansion du Baugeois n'ont duré qu'une semaine et n'ont réuni que 16 personnes. En fait, il s'agit d'une organisation de tourisme crée par l'ancien secrétaire de ce dit comité. Il ne pourra pas être donné suite à d'éventuelles demandes futures de cet organisme.

Le passage qui a eu lieu à la Pentecôte a réuni 60 personnes pendant trois jours.

Le wek-end de jeunes espérantistes de la région n'a pas pu avoir lieu faute d'une participation suffisante.

STAGES DE L'ÉTÉ :

L'enregistrement des inscriptions devient de plus en plus difficile pour M. et Mme Babin qui en ont la charge. Beaucoup d'espérantistes semblent s'imaginer que la M.C.E. fonctionne comme une agence de voyages et demandent des renseignements et des services de toutes sortes. La première période s'annonce bien avec 80 inscriptions dont plus de la moitié de non-francophones de 10 nationalités. La deuxième période réuniera au moins 80 personnes et le nombre d'étrangers sera également important. Au cours de ce stage un groupe de congressistes de l'I.C.E.M. viendront le temps d'un repas. Il y a déjà 50 inscrits pour la troisième période. Les activités seront celles qui avaient été prévues. Le 5 septembre aura lieu un passage scolaire. Au mois de juillet Tespa viendra donner une représentation théâtrale. Au programme : « Rekta metodo » et « La juda edzino ».

1981 :

L'étalement des vacances scolaires ne semble pas devoir imposer de modification dans le calendrier des stages de l'an prochain. Afin de mieux connaître les désirs et les projets des participants un questionnaire est envisagé qui serait remis l'année prochaine.

TRAVAUX :

Les nouvelles tables de salle à manger doivent être livrées début juillet. Un tableau va être installé dans la nouvelle salle de cours. La rénovation du système électrique dans les communs sera achevé le 1er juillet. Dans le couloir du deuxième étage le carrelage a été récupéré et remis en place à moindre frais. Divers appareils de nettoyage ont été achetés ainsi qu'un duplicateur à alcool. Le pont a été consolidé, mais il va falloir cimenter le déversoir de l'étang car des infiltrations ont provoqué un effondrement près de la route. La réparation de la pompe a été particulièrement couteuse. La détérioration étant due à une erreur de l'électricien celui-ci devra se tourner vers son assurance. Le poste téléphonique prévu sera installé dans l'office avant la fin du mois. Certains participants retrouvant difficilement les salles aménagées dans les communs celles-ci vont être numérotées et un plan sera affiché dans le salon.

LA T.V.A. ET LES ASSOCIATIONS :

Il ressort d'un document présenté par le président que la M.C.E. n'est pas imposable à la T.V.A. en vertu d'un décret du 29 décembre 1978 applicable depuis le 1er janvier 1979. L'éxonération est accordée aux associations à but non lucratif pour tous services rendus aux membres.

DISPONIBILITÉS FINANCIÈRES :

Au 20 juin, elles étaient, en gros, de : Caisse : 8.000 ; B.N.P. : 10.000 ; B.P.B.A. : 15.000 ; C.C.P. : 6.000 ; Caisse d'Epargne : 25.000.

Comme chaque année les parterres ont été fleuris par les soins de M. Métivier qui s'applique toujours avec bonheur à cette tâche et le Conseil l'en remercie chaleureusement.

L'ordre du jour étant épuisé la séance est levée à 12 h. 45.

Le secrétaire de séance :
Guy DAIRON.

INTER NI

Ni pli kaj pli ricevas telefonvokojn el ĉiuj kontinentoj por rezervado de ĉambroj. Ŝajnas ke la vokantoj pensas ke ili trovos komercan strukturon por respondi. Estos necese verki teksteton klarigantan la funkci-sistemon de nia Esperanto-Domo. Tiu teksteto estos sendita al ĉiuj informpetantoj.

La tri diversaj someraj periodoj fariĝas pli kaj pli internaciaj. Lastan someron, la nombro da nefrancaj ĉeestantoj dum tempo superis la nombron da francoj.

FONDUSO FOTOKOPIILO

Total précédent :	2.849,60
Mme Clerc	100
Mme Ledan	100
Mme Chagnoux	100
Nouveau total :	3.149,60

NOS JOIES

Le 22 avril est né, à Sens, Fabien Gillet, troisième petit-fils de notre amie Marcelle Turin. Félicitations aux parents, à la grand-mère, et tous nos vœux à Fabien.

NOS PEINES

Nous avons appris le décès de notre ami Volpelière, de Nîmes. Que son épouse, bien connue des espérantistes et des Citoyens du Monde trouve ici le témoignage de toute notre sympathie.

Pour vos lectures d'été,

Pour animer vos réunions de groupe
à partir de textes vivants,
et magnifiquement traduits,

NORMANDAJ RAKONTOJ

de Guy de MAUPASSANT
traduit par Roland DUPUIS

210 pages, relié pleine toile,
illustrations originales
de Robert A. Pinchon

PRIX : 36 Francs
— Réduction à partir de 3 exemplaires —

APPEL

Plusieurs amis ont répondu à notre appel concernant « La Nica Revuo » et, grâce à eux, notre bibliothèque possède maintenant tous les numéros parus de cette revue de valeur.

Par contre, aucune proposition ne nous a été faite concernant « La Pirato ». Voici quels sont les numéros qui nous manquent :

1a jaro, nos 2, 3, 4, 5
2a jaro, no 2
3a jaro, no 4

Merci à ceux qui pourraient nous aider à compléter la collection.

NOTRE LIBRO-SERVO
EST OUVERT
PENDANT TOUT L'ETE
Vous pouvez commander par téléphone
16-41-89-10-34